



KULTURA KAJERO de la *Asocio Amikoj de CDELI* Aŭgusto 2017

El prelegoj okazintaj dum
Stud- kaj preleg-sabato,
la 18an de marto 2017



Tazio Carlevaro

Mónika Molnár

Nicole Margot

Nancy Fontannaz

Claude Gacond

Luko Allemand

Stefano Keller



Enhavo:

D-ro Tazio Carlevaro:
CDELI FARIĜIS 60-JARAĜA
paĝoj 1 - 9

Luc Allemand:
Pri lingvaĵoj de la esperanto-junularo
paĝoj 10 - 13

Nicole Margot:
Pri Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)
paĝoj 14 - 15

Mónika Molnár:
Esperanto en la lernejo La Grande-Ourse
(anonco pri publikigota prelego)
paĝo 16

KULTURA KAJERO de la Asocio Amikoj de CDELI

Redaktoroj: Claude Gacond kaj Stefano Keller

Eldonanto: Asocio Amikoj de CDELI,

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI),

Biblioteko de la Urbo, Strato Progrès 33,

CH-2300 La Chaux-de-Fonds (NE), Svislando. Telefono: +41 32 967 68 42

Aŭgusto 2017



D-ro Tazio Carlevaro: CDELI FARIĜIS 60-JARAĜA

Enkonduko

Saluton al vi ĉiuj, kaj dankon pro via invito.

Mi ne pretigis historian priskribon. Permesu nur, ke maljunulo proponu kelkajn memoraĵojn, kaj kelkajn punktojn, kiuj por li estas kaj estis gravaj. Duona horo estas ja interesa tempo, sed ne sufiĉa por ĉion mencii. Mi klopodos komenci per temo iom specifa.

1. Svislando, lingvoj, kaj lingvoplanado

CDELI estas kolekto, valorigejo kaj studejo de ĉio, kio rilatas planadon de lingvoj, okazanta por krei aŭ apliki internacian lingvon planitan.

Svislando, el la lingva kaj lingvoplanada vidpunktoj, reprezentas riĉan eksperimentejon.

- *Kvar lingvoj naciaj, el kiuj tri estas samrangaj ("oficialaj")*
- *Rimarkinda alteco de multlingveco: la svisoj ĝenerale kapablas utiligi pli ofte alian lingvon ol la sia, pli ofte ol en aliaj landoj. Indas rimarki, ĉi tie, ke la esperantanoj estas ankoraŭ pli poliglotaĵ ol "normalaj" svisoj.*
- *Konstruo de diglosio (funkcia dulingveco) en Alemanio. Tiu konstruo fariĝis ĉiam pli intensa ekde 1914.*
- *Konstruo de interromanĉaj lingvoj: de Bühler, tra Leza Uffer, ĝis la nuna oficiale utiliigata Rumantsch Grischun*
- *Konstruo de vaŭda centra dialekto, ekde 1862.*

- *Natura kresko de intertiĉina dialekto, nomata „fervoja dialekto“, kiu multloke anstataŭis la pli fruajn lokajn dialektojn. Mi mem lernis kaj parolas la t.n. “fervojan” dialekton.*
- *Lerno de alilandaj lingvoj, kiuj ne havas rektajn rilatojn kun Svislando: aparte la angla kaj la hispana, sed ankaŭ la slavaj lingvoj.*
- *Flego de antikvaj lingvoj: latina, greka, hebrea, egipta, praĝermanaj lingvoj, en niaj universitatoj.*

Sed jen io plua.

- *En nia lando, vivas etaj partoj de la svisa popolo, kiuj decidis krom-aparteni ankaŭ al aliaj lingvokulturaj grupoj.*
 - *Ofte, temas pri homoj, kiuj naskiĝis en aliaj landoj, aŭ en familioj de ne-svisa kulturo. Enmigrintoj, do.*
 - *Kelkaj estas tipe svisaj civitanoj, sed decidis adopti novan lingvon, kies radikoj troviĝas ĉie, kaj samtempe nenie: Esperanton.*
 - *Pli frue ekzistis, sed parte ankoraŭ nun ekzistas, aliaj homgrupoj, kiuj agis simile, sed adoptis alian lingvon ol Esperanto, lingvon kun same “speciala” origino.*

2. Emo ludi per lingvo: ĉu en-uze, ĉu perkonstrue

***Ekzistas homoj, kiuj ŝatas ludi per lingvoj. Iuj ludas per ekzistanta lingvo, iuj flegas lingvon artefaritan, aŭ eĉ rekte konstruas unu el ili.
Ĉu ni konsideru tion « stranga » afero ?***

La afero, prrincipe, ne estas stranga: la ludo per lingvo, kaj la konstruo de lingvo estas ofte ŝatata ludo de la homoj, ofte junaj, en multaj landoj kaj en multaj epokoj.

- *Ĝi konsistas el ludo per ekzistanta lingvo, inventante strangajn kunmetojn, aŭ inventante vortojn novajn. Kun celo amuziga, sed ankaŭ estetika. La infanoj ofte ŝatas ĉi tiun ludon.*
- *Ĝi konsistas ankaŭ el kreo de novaj lingvoj. Ili kelkfoje havas rolon en junularaj medioj. En Mendrisio, ekzistas junulara “sekreta” lingvo, nomata larpa iudre, en kiu “Mendrisio” aperas kiel “Ndriòme”. Ĝi estas speco de ĵargono, kiun utiligas cetere ne nur junuloj, sed ja ankaŭ plenkreskuloj, kiuj ne deziras esti komprenataj de “eksteruloj”.*

Origino kaj naturo de tiu plezuro ne estas unusola.

- *La germana verkisto Stefan George, kiu longe vivis en Tiĉino, konstruis propran planlingvon kiel estetikajn provon, en kiu li verkis multajn poemojn.*
- *En Ĝenevo, fine de la 19-a jarcento, juna mediumino, Hélène Smith, utiligis sian lingvoludemon por konstrui en hipnota stato unue pra-hindan lingvon, kaj poste kelkajn marsajn lingvojn. Mi supozas, ke ŝi faris tion ĉar ŝi havis la impreson ke la ĉeestantoj tion ekspektis de ŝi, kaj aparte, profesoro Théodore Flournoy.*

La granda Reto multe disvastigis tiun ĉi emon ludi per lingvo kaj tra lingvo.

En ĝi vi trovas sennombrajn ekzemplojn, i.a. la Klingonan, kiu celas montri, kiel povus funkcii lingvo, kiu nenion ŝuldas al la ĝenerala strukturo de la teraj lingvoj.

3. ... Sed iuj grupoj adoptis ja konstruitan lingvon

Kiel funkcias la grupoj, kiuj proponas lingvon sen patrio?

Tiuj grupoj funkcias precize same kiel tiuj homgrupoj, kiuj volas kultivi nacian kulturon. Maksim Gorkij proponas priskribon pri la origino de la amo al la rusaj lingvo kaj kulturo, sed kiu aplikiĝas bone al la mondlingvaj movadoj.

Kiel fundamento ekzistas popolo. Tiu popolo estis la fonto de ĉiuj valoroj, materiaj kaj spiritaĵoj. La popolo kreis la lingvon, la mitojn, la religion, la eposan poezion, kaj la heroojn. Ili kreis kulturan tradicion. Ĉar la homgrupo fariĝis, nombre, pli ampleksa, la komunumo devis elekti pastrojn kaj ĉefojn. Unuopaj personoj estis identigitaj kun la heroaj figuroj de la tradicio, sed iom post iom profundigis la diseco inter la popolo kaj la reganta kasto. Naskiĝis internaj konfliktoj. ... Finfine, tio kaŭzis ribelojn, militojn, kaj senfinajn konfliktojn.

Interesa afero: la “nasko de popolo kaj de tradicio”, laŭ tiu priskribo, estas fakte mitologia ellaboro, kiu permesas al ni kompreni fenomenon, kiu tute certe okazis alimaniere. Sed ja tion celas mitologio: ĝi donas al ni modelojn, kiuj faciligas al novuloj adaptiĝi al la socio, kie ili devas ensociiĝi.

Tiujn esprimojn ni aŭdas en iuj esperantistaj medioj. Certe, la “esperanta popolo” funkcias iom aliel ol tiu mitologia “prarusa” popolo. Sed tiu mitologio permesas faciligi la transformon de novbakitaj esperantanoj al “lojalaj” esperantistoj.

Mi deziras ĉi tie aldoni kelkajn rimarkojn pri la ofta uzo de “mito” en ĉi tiu kunteksto. La homo disponas pri mito-fara kapablo (faculté mythopoiétique), per kiu la homoj konstruas rakontojn, per kiu li provas klarigi, kial io estas tia, kia ĝi estas. Temas grandparte pri fantaziaĵoj, kiuj tamen fariĝas akceptataj, se il respegulas la etoson kaj la bezonojn de la epoko. Tiuj mitoj estas fundamentoj de la homaj kulturoj. Feliĉe, la homo disponas ankaŭ pri la kapablo pensi kritike. Tempa hiatu faciligas la rekonon de mitoj. Tial naskiĝis la scienca historio, t.e. la esploro kaj la rerakonto racia kaj konkreta de la historiaj eventoj.

La planlingvaj movadoj, principe, estas homgrupoj, kiuj proponas ankaŭ etikan mesaĝon al la homaro. Temas pri mesaĝo de paco, de toleremo, de demokratio, de kunlaboro, de libero, de digno, de racia solvo de malfacilaĵoj kaj konfliktoj. Ĉefrimedo por tion atingi konsistas en taŭga interkompreniga lingvo. Kiu, krome, estu neŭtrala, t.e. artefarita, facile lernebla.

- Tiu mesaĝo substrekas la gravecon de interkompreniga lingvo.
- Tiu komuna lingvo devas esti prefere artefarita, neĝepatra. Kiun oni lernu facile.

En nia kazo, tiu movado proponas specifan lingvon. Sed aliaj grupoj proponas religion, ekonomian modelon, politikan sintenon, edukatan programon. Ili ĉiuj havas kulturan celon. Ili ĝenerale ne atingas la specifan celon, sed kunhelpas en la ellaboro de kulturaj ŝanĝoj kaj vivo-transformoj.

Estas fakto, ke ni vivas pli “humanece” ol antaŭ 10 mil, 2 mil, 100 jaroj, dank al tiuj kulturaj proponoj.

Sed kulturo ne herediĝas biologie. Ĝi herediĝas nur per en-familia kaj ekster-familia edukado, kaj per konduta trejnadado en socio.

Pro tio, kulturo estas fragila konstruaĵo, kiu povas rapide malintegriĝi kaj malaperi. Sen la kulturo, ni estus mamuloj el 400 mil jarojn antaŭ nun. Kun specifa mamula moralo: solidareco de eta grupo, malsamaj roloj de seksoj, dominado de alfa-individuoj, malamikeco kontraŭ ekstergrupanoj.

Kulturo-kapablo povis evolui, ĉar paralele evoluis kapablo pensi per konceptoj, kaj paroli, nome konatigi engrupe la rezultojn de niaj pensoj. Montriĝis, ke tiu kapablo iom post iom kreis kulturon, kiu kovris, ja, sed ne forigis nian originan biologian moralon.

- Ĝi, do, devas relerniĝi en ĉiu generacio, kaj povas perdiĝi en kelkaj cirkonstancoj.
- Tiu laŭgeneracia rekonstruo kaj re-lerno permesis tamen, ke la kulturo adaptiĝas al la ŝanĝoj de la fakta mondo en kiu la homoj vivas. Resume: kulturo ŝanĝiĝas, transformiĝas, modifiĝas.

4. La konstruo de ni-sento, esenca por la pluvivo de grupo en difinita kulturo

Fundamenta funkcio de kulturo estas la konstruo kaj firmigo de “ni-sento”.

Por konstrui la ni-senton, necesas priskribi aŭ preskribi la ecojn, kiuj igas la grupon malsama disde la “aliaj grupoj”. Kio estas al ni komuna, kaj kio ne troviĝas aŭ troviĝas aliel ĉe aliaj grupoj.

Tio permesas konstrui kelkaj ilojn, kiuj faciligas kunvivon, sed ankaŭ distingon disde “fremdaj” grupoj.

- Komuneca etika sento: nome, rilate al la pritakso de bono kaj de malbono.
- Kunigaj laboriloj: revuoj, ĵurnaloj, komunikiloj.
- Komuna mitologio pri la origino, kaj la hodiaŭa graveco de la movado aŭ de la grupo
- Mitologia pritrakto rilate la naturon de la ilo (en nia kazo: la lingvo)
- Kuna mitologio kaj skolastiko pri la fondo de la movado
- Ĝenerala mitologio pri la esenco, strukturo, efikoj de la lingva celaro
- Mitologiaj eksplikoj por kompreni eventualajn malvenojn, aŭ malprestiĝon estergrupan.
- Ellaboro de internaj vojoj por atingi gvidon, prestiĝon,

Resume:

- Temas pri laboro komuna. Ĝi faciligas la kreon de specifaj kunkonsentitaj valoroj. La valoroj, reciproke, faciligas la laboron komunan.

Tio kondukas al la interngrupa grandigo de principe malgrandaj aŭ malgravaj problemoj

Ni povas tion nomi “algapo al propra umbiliko”:

La “popolo” centriĝas sur kaj pri propra kulturo, kaj distanciĝas de la fakta mondo ekzistanta. Kelkfoje tio aspektigas la grupon kvazaŭ sekta transformiĝo. Tio estas ofta okazaĵo ĉe malgrandaj, similkonsistaj, memcentrigitaj grupoj.

Tiamaniere, detaloj fariĝas grandegaj, decidaj, kaj transformiĝas de diskuteblaj aspektoj al personaj. Tio estas la bazo de ebla diseriĝo de la grupo. Formiĝas pli malgrandaj grupoj, samstrukturaj kaj samfunkciantaj.

Rilate lingvon kaj movadon, en Esperantio ni rimarkas la jenajn konfliktojn, kiuj servas ne tiom al la klarigo de la sukcesoj, sed al la klarigo de la malsukcesoj.

- Konfliktoj rilate la idealon de lingvo, kaj la idealan lingvon
- Sed ĝuste pri tio, la kriterioj ne estas klaraj. La pridiskutataj kriterioj koncernas la ekonomion de la lingvo. Ilin influas celo, estetikaj konsideroj, lingvosciencaj konsideroj, ktp. Sed ja: temas pri nur relativaj kriterioj.

Ekzemploj el la Esperanta-mondo

ATA – ITA

UJO – IO

CXAPELOJ – UZO DE “H” – UZO DE “X”

- Sed interesaj umbilikaj vidpunktoj rilatas ankaŭ la organizajn demandojn. Fakte, ofte montriĝas, ke ĉi tie rolas plej videble ankaŭ personaj kaj monaj demandoj.

Organizado: UEA – IEL

Finvenkistoj – Movadistoj

Estas evidente, ke, interne de unuopa Ni-konscio, naskiĝas ankaŭ personaj konfliktoj, kiuj emas kamufligi al prilingvaj, primovadaj ĉeftemoj, kaj kiuj akiras la dimension de grava malkonkordo.

Se tiuj konfliktoj akriĝas, la grupo disrompiĝas.

Ni rimarkas tion, ĉefe se temas pri konfliktoj, kiuj koncernas ankaŭ la lingvon. Speciale: Kiel estu la plej taŭga planlingvo?

Sekve de la konflikto kaj de la nasko de nova movado, ankaŭ la Ni-konscio modifiĝas.

Tial ekzistas kaj ekzistis konfliktoj inter la malsamaj planlingvaj movadoj.

Sekve de tio, tiuj mikrogrupoj ne nur interkverelas, sed emas eĉ detrui sin reciproke.

Estus longe, sed certe interese, analizi la diversan prezentiĝon de la ni-konscio, kiu rilatas la diversajn lingvojn en la diversaj lingvomovadoj.

- Volapük, 1879 (Pastro Schleyer)
SAME Malfacila por CXIUJ
- Esperanto, 1887 (Doktoro Zamenhof)
SAME FACILA por CXIUJ
- Ido, 1907 (Profesoro Couturat, kaj Louis de Beaufront)
LINGVO SKEME LOGIKA KAJ BELA
- Occidental, 1922 (Eduard von Wahl)
SIMILA AL LA NOVLATINAJ LINGVOJ, KAJ FACILA
- Interlingua, 1951 (Doktoro Alexander Gode – von Aesch, kaj Blair, IALA)
SIMILA AL LA NOVLATINAJ LINGVOJ, KAJ TUJ KOMPREENEBLA

Jen la momentoj, kie plej evidente la mondlingvaj movadoj montriĝis inter si malamikaj, subfosante, kelkfoje, prestiĝon ankaŭ ĉe la ekstera mondo.

- Esperanto – Ido okaze de la decido de la Delegacio en 1907
- Esperanto- Ido okaze de la ekzameno de la Societo de la Nacioj
- Ido – Occidental, okaze de la apero de tiu ĉi lingvo

- Occidental – Interlingua, okaze de la kreo de UMI
- Sed ankaŭ interne de la esperanto-movado: UEA – IEL,
- Kaj eĉ interne de la unuopaj naciaj movadoj (Esperanto, Ido).

5. Lingvokonstruo ne ĉiam atingis ankaŭ konstruon de movado. Temas pri ĉi tie pri lingvo-projektoj.

**Sed ne nur movadoj:
en Svislando aktiva estis la lingvo-kreo kiu ne ricevis ian atenton far de la publiko**

Mi aludis al kelkaj ekzemploj de lingva planado en Svislando.

Sed multaj svisoj aŭ nesvisoj publikigis en Svislando planitajn lingvojn, kiuj grandparte ne akiris atenton ĉe la ĝenerala publiko, kaj tial ne sukcesis krei ĉirkaŭ si movadon. Mi supozas, de 1750 al nun, ke temas pri pli ol 30 projektoj. Kelkaj estas tre interesaj, kelkaj fakte nuraj skizoj, aŭ paŭsaĵoj de jam ekzistantaj projektoj.

Atentigo pro domo mea.

Dank al CDELI, kaj al aliaj bibliotekoj (Zentralbibliothek Zürich, Nationalbibliothek Bern), mi komencis, sed ne konklude finis, detalan liston de lingvaj kreaĵoj aperintaj en Svislando. Mi ŝatus reeldoni komplete tiujn nun maloftiĝintajn broŝurojn.

Jen provizora listo.

1774: Patro Francesco Soave, luganano, edukisto kaj universitata profesoro (Pavia) eldonis libron pri la konstruo de internacia lingvo, kiu anstataŭu la latinan.

1788: Projekto de De Ria, sviso, kiu vivis en la tiama Sankta Petersburgo. Temis pri maniero transskribi la sonojn de la lingvoj.

1848: Stoechiophonie, (sed al ni konata nur tra traduko de Matthis, en Soloturno, en la jaro 1861): de HJF Parrat, el Porrentruy. Temas pri lingvo simila al la filozofiaj skemoj.

1884: Lina kosmana (Weltsprache, de W. Juhle, Davos)

1889: Kakografie, de F. Fridrich, germano, el Görlitz, sed publikigita en Zuriko, kun sistemo transskribi lingvojn. Libro, kiu jam citas pozitive la ĵusaperintan Lingvo Internacia.

1900: Langage Humain (Umano, Berno)

1900: Lingua komun (Kürschner, kiu longe estis esperantisto, kaj vivis en Ĝenevo, sed fine publikigis sian broŝuron en Orselina).

1912-16: Tersboca (Max Rotter). Temas pri alvoko por la konstruo de internacia lingvo, lige kun la kunigo de la tuta mondo en pacan asocion.

1918: La Parlamento (Géo Ferry, pseudonimo de G. Perrier), en Saint-Imier

1923: Espido (de Marcel Pesch, luksemburgano loĝanta, tiam, en Ĝenevo), pli poste rimarkinda leksikologo idista.

1925-6: Espido (ankaŭ nomata Espo) de Petro Stojan, sub la pseŭdonomo Ribaulb, kiu tiutempe loĝis en Ĝenevo, kiel oficisto ĉe UEA. Cetere. Stojan estis tre aktiva lingvo-konstruisto. Eble li konstruis pli ol 10 malsamajn lingvoprojektojn.

1925: Latin simplifié (Reverchon, Neuchâtel)

1932: Fitusa (B. Rosenblum, Bazelo)

1932: Projekto de Ritter, grava funkciulo de Internacia Labor-Organizaĵo, kiu proponis skemon, por krei internacian lingvon. Tiu verketo tre interesigis min.

1938: Soma, ĉiam de B. Rosenblum, ankaŭ en Bazelo.

1947: Neolatino, André Schild, Bazelo

1959: Lingua de Europa, Patro Flurin Maissen, en Disentis/Mustér, tra Li Gimnasiast

1959: Lingua Europaea, de W. Schaetzel, aperinta en Ĝenevo.

Aldoniĝas la lingvoj, kiujn elkovis De Saussure

1907: Antido 1

1910: Antido 2

1912-13: Kosmopolita

1919: Esperantida

1925: Novesperanto

1929: Mondialo

1937: Esperanto II

Cetere, en Svislando oni ne nur agis movade, aŭ kreis lingvojn. Interalie, okazis ankaŭ sciencaj kunvenoj.

1930: IALA (fondita en 1028), en Ĝenevo: Jespersen, Collinson, Auerbach, Bally, Debrunner, Funke, Hermann, Karcevski, Séchehayé

1931: Deuxième congrès international de linguistique.

6. Kelkaj indikoj pri CDELI

Kial CDELI estas ne nur utila, sed absolute necesa ?

Estas necesa nova kompreno de la kulturo necesa en planlingva movado.

Tiuj movadoj estas eroj de nia kulturo. Kaj la kulturo estas frukto de pripenso, de agado, de konfronto. Indas kontribui al la kreo de kulturo de interkompreno.

- Montriĝis, ke konfliktoj internaj kaj eksteraj fakte nur malhelpas la atingon de la socia celo. Ni ĉiuj, kune, devas trovi manieron elporti ilin konstruive.
- La celo- kaj aparte mia kaj ankaŭ nia celo - ne estas “venki”, sed kunlabori al la socia – komuna – bono. Tiu kunlaboro estas kultura entrepreno.

Ilo por tion faciligi estas la konstruo de komuna memoro. En ĝi, la malsamaj trovas klarigon kaj valorigon. Ili fariĝas parto de nia historio, kaj tio permesas ampleksigon de nia ni-konscio.

Ĉu entute tio eblas ?

- Temas pri Zeitgeist (epoka etoso). Temas pri lernado el eraroj. Temas pri fajniĝo de la etika penso.
- Temas pri socia praktiko kiu aliloke havis pozitivajn rezultojn.

Supozeble, la sinteno de Edmond Privat, aktiva defendanto de Esperanto, estas bona vojmontrilo. Li estis ankaŭ ekzemplo por ne-agresema maniero alfronti la multecon de la planlingvaj movadoj, kaj la ideologiajn aspektojn de ilia respektiva mitologio

CDELI naskiĝis en la spirito de Edmond Privat, sed la faktan laboron faris kelkaj gravaj pioniroj, al kiuj ni estu dankemaj.

- Lia disĉiplo Claude Gacond, kiun kunhelpis ekde la komenco lia edzino
- La biblioteko kaj la urbo La Chaux-de-Fonds
- La multegaj sindediĉaj bonvolulaj kunhelpantoj
- La multegaj donacintoj, vizitantoj, esplorantoj, amikoj
- La iama sinergio kun KCE

Estas malfacile mencii la homojn, kiuj iel kunlaboris, influis, kaj helpis, ĉar mia listo estas principe tre manka, mi estas konscia pri tio.

- Alphonse Matejka, Claude Piron.
- Kritike sed kunhelpe: André Schild, Ric Berger, Reinhard Haupenthal, Istvan Szerdahelyi, Ivo Lapenna, Andreas Juste, Verloren van Themaat.
- Mi memoras ankaŭ pri aliaj vizitantoj, kiuj kontribuis per materialo kaj per ideoj: Andreas Juste, Emma Louise Bosshard, Clara Kreis-Schneeberger, Edouard Waterkotte, Henri Meier-Heucké, Ernst Anderegg-Gürtner. Homoj nekonataj al vi, supozeble, ĉar temas pri jam de longe mortintaj idistoj.

Konata, sed ja agnoskinda, estas la celo de la CDELI-laboro:

- Scienca arkivado por dokumenta celo
 - ... kiu faciligos sciencan esploron
- Neceso kaj utilo konstrui memoron komunan.
- Krei kaj flegi humanisman, tolerem-orientitan, kulture aktivan, demokratecan etoson.

Tio koncernas ĉiujn movadojn ekzistantaj aŭ ekzistintaj en Svislando, kun aktivado pri kiu oni havas dokumentojn plej malsantipajn.

Ni ne forgesu, ke ekzistis ankaŭ momentoj, en Svislando, kiuj rolis multon en la konstruo de movadoj, aŭ en la starigo kaj fortikigo de sciencaj esploroj.

7. Kelkaj atingoj de CDELI

Kion konkrete kreis kaj/aŭ faciligis CDELI ?

CDELI estas vivanta arkivejo

CDELI estas vivanta arkivejo, ĉar ĝi kolektas materialon, valorigas ĝin, kaj faciligas multilate la sciencan esploron en interlingvistika kaj esperantologia kampoj.

Ĝi estas ne nur libro-kolektejo, sed ankaŭ arkivo-prilaborejo, kiu malfermas siajn pordojn al exploremuloj, kaj disponigas al tiu lasta ankaŭ modernajn laborinstrumentojn.

En ĝi, la scienca kaj kultura agadoj estis kaj daŭre estas gravaj. Mi ĉerpas kelkajn momentojn, el la multaj, kiujn mi atente spektis aŭ rekte partoprenis

Jen kelkaj atingoj, kiuj, laŭ mi, estas tre gravaj. Ili montras, ke CDELI kapablas kunlabori en taskoj malfacilaj, por atingi celon en scienca kampo. Certe ekzistas multaj aliaj, sed mi mem ilin partoprenis aŭ vidis persone, el proksime. Kompreneble ekzistas multaj aliaj, kiujn mi ne mencias.

Ellaboro kaj disvastigo de esperantologiaj temoj kaj interlingvistiko

Ĉe CDELI, delonge, organiziĝas kunvenoj, kiujn oni dediĉas al la profundo, studo, ellaboro de temoj, kiuj rilatas esperantan literaturon, esperantan lingvon, interlingvistikon, kaj branĉojn de esperantologio. Ili estas gravaj momentoj por la objektiva konstruo de ni-konscio, kiu kapablas integri ankaŭ la malsamojn, ne nur la samaĵojn.

“Universalaj lingvoj en Svislando” de Andreas Künzli

Rimarkindas la impona libro de Andreas Künzli, *Universalaj lingvoj en Svislando*. Andreas ofte laboris tiucele ĉe CDELI, kaj tiu frekvento supozeble kreis la emon verki tiom gravan verkon, kaj ĝin plenfini.

Leterinterŝanĝo Couturat-Russell

La arkiva heredaĵo de la luksemburgano Henri Meier-Heucké ne nur permesis unuan grandan kreskon per ne-esperanta materialo, sed permesis la malkovron de grava leterkolekto, interŝanĝita de Louis Couturat kaj Bertrand Russell, ne pri lingvoj aŭ planlingvoj, sed pri matematika filozofio. Fine, ĝi aperis duvolume en 2001, far Anne-Françoise Schmid (*Russell-Couturat: Correspondance sur la philosophie, la logique et la poétique 1897-1913*).

Ĉe CDELI okazis du kunvenoj pri planlingvoj. En ambaŭ kazoj, la organizintoj fine prezentis libroforme la referaĵojn.

Carlevaro, T.: Red.: *Contributions au Premier Colloque d'Interlinguistique CDELI*. Bellinzona (Hans Dubois).

Deuxième Colloque d'Interlinguistique: Domaine de la recherche en linguistique appliquée, 1998.

Unu grava Ido-renkontiĝo okazis en 1981.

Okaze de la internacia Ido-renkontiĝo (Ido-Konfero) en Joinigny (Svislando), kiu okazis inter la 29-a de aŭgusto kaj la 3-a de septembro 1981, eta grupo da kuraĝuloj aŭdacis organizi, parte ĉe KCE Kultura Centro Esperantista, parte ĉe CDELI (*Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale*), en la neŭsatelkantona urbo La Chaux-de-Fonds, kulturen seminarion, gvidatan de Andreas Juste, inter la 24-a kaj la 28-a de aŭgusto.

Finfine aperis la tekstoj de la kurso de Andreas Juste: *Idala foliumi*. Bellinzona: Editerio Hans Dubois 1998. 80 p.

Bibliografio de Ido, de 1900 ĝis jaro 2000

La arkiva riĉaĵo de CDELI estis la komenca bazo, sur kiu kreskis alia grava verko, la *Bibliografio de Ido*, kiu reaperis en dua eldono aktualigita en 2005. La aŭtoroj estas Reinhard Haupenthal kaj mi mem.

Dank al CDELI, KCE, SES inter 1994 kaj 1996 eblis al mi ellabori enketon pri la tiama konsisto de la svisa Esperantistaro

Mi malkovris, ke laŭ sia demografia konsisto, la Esperanto-movado similas al partio aŭ al prem-grupo, kaj ne al "popolo", kiel asertas kelkaj aŭtoroj. Zamenhof proponis Esperanton, kiel lingvo kun kultura kaj etika animo. Eble ni hodiaŭ troviĝas antaŭ kultura kaj etika movado, kun lingvo. Memcentra, plurkultura. Tre kverelema, sed ja ĉie.

Indus refari tiun enketon, por ekzameni eventualajn ŝanĝojn aŭ pluevoluon.

Konkludo

Indas konkludi. Per danko al ĉiuj kunlaborintoj kaj kunlaborantoj, kaj per invito al la pli junaj ĉeestantoj kaj ne-ĉeestantoj, al partopreno aktiva al tiu granda projekto, kiu jam atingis grandan nivelon, sed kiu esperinde fariĝos pli aĝa ol ni estos.

La homa vivo havas limojn. La vivo de arkivoj bone flegataj kaj frekventataj estas tendence eterna – aŭ preskaŭ.

Dankon pro via atento.



Luc Allemand: *Pri lingvaĵoj de la esperanto-junularo*

Ri, iĉ, mojosa... : La lingvo evoluas

Kiam mi eklernis esperanton, mi lernis regulojn elpensitajn de Zamenhof, kaj vortojn ankaŭ elpensitajn de li krom eble kelkajn novajn substantivojn, kiuj aperis poste por priskribi novajn realaĵojn. Tiuj substantivoj tamen estas jam rekonataj de ĉiuj kaj eniris vortarojn kiel PIV. Tiam mi komprenis, ke tiuj reguloj kaj vortoj estu strikte uzataj, kiel Zamenhof indikis. Tio ja havas logikon kaj sonas bone, ĉar se iu-ajn komencus uzi la lingvon iel ajn, tio kaŭzus ĥaoson kaj ni finfine ne plu komprenus unu la aliajn.

Tamen Zamenhof ankaŭ diris, ke li lasas la lingvon al la homaro. Tio estas, ke la lingvo ne apartenas al li, ĝi ne estas absolute fiksita, sed ĝi apartenas al siaj uzantoj, kiuj eventuale povas evoluigi ĝin. Nur la fundamento restu fiksa, neŝanĝebla. Sed la fundamento ne estas granda, ĝi lasas multan liberecon.

Dum miaj vojaĝoj al internaciaj esperanto-renkontiĝoj – mi diru ĉefe junularaj renkontiĝoj sed ne nur – mi eksciis pri ekzisto de novaj vortoj, de alternativaj vortouzoj, de novaj sufiksoj. Ili ne estas Zamenhofaj kaj ofte ne aperas en vortaroj – aŭ ankoraŭ ne – sed ili ja fariĝas uzataj de pli kaj pli da esperantistoj. Unue mi estis tre respektima al la fundamento, kaj al tio, kion mi lernis infanaĝe. Sed poste mi memoris tion, kion diras lingvistoj, ke vivaj lingvoj evoluas, ke estas normale, kaj mi iom malfermiĝis – iom, ne tro – al la neologismoj, despli ke kelkaj el ili estas racie defendeblaj kaj entuziasme defendataj. Ĝis nun mi neniam aŭdis tiujn neologismojn en Svislando, kaj parolinte kun svisaj esperantistoj mi havas la impreson, ke la neologismoj, pri kiuj mi volas paroli ne estas konataj ĉi-tie. Mi faras la hipotezon, ke ties kaŭzo estas, ke granda parto de la svisa esperantistaro – kies aĝo-averaĝo pli altas la aĝo-averaĝon de internacia esperantistaro – ne iras al la samaj renkontiĝoj kiel mi. Tial, mi trovas oportune klarigi ĉi-tie kelkajn evolu-aspektojn de nia lingvo.

Pri kiuj renkontiĝoj temas? Jen listo de kelkaj el tiuj, kiuj ekzistas en Eŭropo:

Somere:

- UK (Universala Kongreso)
- IJK (Internacia Junulara Kongreso)
- IIK (Infana Internacia Kongreseto)
- SES (Somera Esperanto-Studado) en Slovakio
- FESTO (Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita) en Francio
- IJS (Internacia Junulara Semajno) en Hungario

Vintre:

- JES (Junulara Esperanto-Semajno) en Germanio aŭ en Pollando)
- NR (Novjara Renkontiĝo) en Germanio
- Luminesk' en Germanio

Printempe:

- PSI (Printempa Semajno Internacia) en Germanio
- IJF (Internacia Junulara Festivalo) en Italio

Mi ne celas fari sciencan studon, nek doni kompletan liston, sed nur raportoj pri miaj observoj, klarigi la signifon kaj foje la kialon de kelkaj vortoj, kaj eventuale doni mian opinion. Ĉiu estos libera uzi aŭ ne uzi tiujn vortojn, sed almenaŭ ĉiu sciu pri ili.

Mojosa: La vorto *mojosa* estas la unua neologismo, kiun mi aŭdis. Mi lernis ĝin en 2009 dum Internacia Junulara Kongreso, kaj ĝi jam aperis iom antaŭe en junulara medio. Ĝi estas konstruita el Modern-Jun-Stila, kaj estas uzata diversokaze por esprimi ion bonan, amuzan, ĝenerale kun la sama senco kiel la angla vorto „cool“. Tiu vorto prenas plej ofte la adjektivan formon : « Tiu loko estas *mojosa* » Ĝi ankaŭ povas preni la adverban formon : « Estas *mojose* ĉi-tie » aŭ eventuale la verban : « Vi *mojosas* ! » Por pliaj detaloj vidu en Vikipedio ekzemple.

Ivi: *Ivi* esas alternativa persona pronomo por plurala *vi*. Ĝi ne estas oficiala, sed estas praktika kaj facile komprenebla en konteksto : Ĝi sekvas la saman logikon kiel *li* (singulara) > *ili* (plurala) – *vi* (ne precizita nombro, povas esti singulara) > *ivi* (plurala). Mi aŭdis kaj eventuale uzos ĝin nur en okazoj, en kiuj gravas ke la alparolatoj sciu, ke ili estas plurale alparolataj.

Inverse ekzistas ankaŭ la pronomo *ĉi*, kiu precizigas singularecon de *vi*. Tiu pronomo ne estas neologismo, ĉar jam Zamenhof elpensis ĝin. Tamen li post mallonge decidis ne uzi ĝin. Ankaŭ mi ne ŝatas ĝin kaj ne uzos ĝin pro du kialoj:

- *Ci* estas aŭ estis foje uzata malfavore, insulte « Ci fripono ! » = « vi malbona friponaĉo ».

Kaj ĝi efektive sonas al mi eventuale taŭga por tia uzo.

- Se oni enkondukus *ci*-n kiel singularon de *vi*, mi timus ke aperus pronoma distingo inter ĝentileca alparolo kaj "malĝentileca", kiel en la franca tu/vous aŭ en la germana du/Sie. Laŭ mi estas avantaĝo de esperanto, ke tiu distingo ne ekzistas ĉar gravas al mi interhoma egaleco.

Tamen aliaj opinias, ke apero aŭ ne de ĝentileca distingo ne dependas de tiu 2a-persona pronomo, ĉar en lingvoj kiel la itala ekz. oni uzas la 3-an personon por ĝentileca pronomo. Do laŭ ili la devojigo al ĝentileca uzo povus jam ekzisti se sufiĉus, ke kelkaj konfuzu ĝin kun sia denaska lingvo.

Ri: Ankaŭ *ri* estas alternativa pronomo, sed tria-persona, singulara.

En „normala“ esperanto, ekzistas la pronomoj *li* por viro, *ŝi* por virino, kaj se oni ne scias, ĉu temas pri viro aŭ virino, aŭ se tio ne gravas, oni uzas ankaŭ *li*. (Ne *ĝi*, ĉar *ĝi* estas nur

por objektoj aŭ bestoj)

Tio estas genre nesimetria. Kial la neŭtrala pronomo estus la sama kiel la vira ? Same aperas manko je genra simetrio kun la uzo de la sufikso *-in* sen paralela vira sufikso.

Kiam mi lernis tiun regulon, mi ne speciale ŝokiĝis kaj mi akceptis ĝin. Sed evidentiĝas, ke ne okazas same por ĉiuj : Mi renkontis personojn, kiuj vere ne povas akcepti tiun mankon de simetrio en esperanto, kaj tial ili serĉis solvojn.

Privilegia solvo estas la nova pronomo *ri*, kiu estas uzata por paroli pri homo, kies genron oni ne volas aŭ ne povas precizigi. Tiam li estu uzata nur por paroli pri viro.

Mi renkontis ankaŭ homojn, kiuj ne ŝatas distingi inter genroj. Povas temi pri transseksuloj, ambaŭseksemuloj - aŭ pli precize *ĉiaseksemuloj* - aŭ simple pri personoj, kiuj opinias ke genra diferenco ne sufiĉe gravas, por ke indu uzi du malsimilajn pronomojn *li* kaj *ŝi*. Aŭ aliedirite gravas al ili, ke oni ne kredu je ekzisto de genra diferenco. Tial ili preferas uzi nur *ri-n*.

Alia alternativa propono estas *ŝli*, kiu estas kvazaŭ kunmetaĵo de *ŝi* kaj *li*. Sed argumento kontraŭ tiu propono estas, ke ĝi ne forigas la ideon de genroj, sed ĝi simple signifus « ŝi kaj/aŭ li ». Plie laŭ la opinio de multaj, la vorto « ŝli » sonas malbele.

-iĉ: Plia solvo al manko je genra simetrio estas la enkonduko de la sufikso *-iĉ*, kun paralela uzo kun la sufikso *-in*. Dum *-in* indikas ke la persono aŭ besto havas femalan econ kaj estos preparolata per *ŝi*, *-iĉ* indikas ke *li* posedas masklan econ.

Tiurilate mi rememorigos fundamentan fakton, laŭ kiu nur malmultaj vortoj estas baze viraj, temas ĉefe pri familianaj vortoj kiel patro, filo, frato, onklo, nepo, edzo, viro... Tiuj vortoj bezonas la sufikson *-in* por esprimi la inan ekvivalenton : (partino, filino...) kaj la prefikson *ge-* por esprimi ke temas pri familianoj de ambaŭ genroj : (gepatroj, gefiloj...) Plej multaj vortoj estas baze neŭtralaj, t.e. ekzemple ĉiuj nomoj de bestoj, de profesioj, aŭ de agantoj (kun sufiksoj *-isto* aŭ kun participaj sufiksoj *-anto*, *ato*, *into*...) Tio signifas, ke oni ne uzu la prefikson *-ge* kun ili (krom se vere gravas precizigi ke temas pri specimenoj de ambaŭ seksoj), kaj same ke oni ne uzu la sufiksojn *-in* aŭ *-iĉ* kun ili, krom se vere gravas precizigi la sekson : « instruisto » povas esti viro, kiu instruas, aŭ virino, kiu instruas.

Tabasami: *Tabasami* estas alternativa, pli fajna vorto por « rideti », kaj tabasamo por « rideto ».

Laŭvorte *rideti* signifas "ridi iomete", aŭ "malgrande rideti", same kiel en la franca « sourire » venas de « sous-rire » (sub ridi/o) aŭ en la germana « lächeln » estas malgrandigo de « lachen » (ridi).

Tamen, ĉu nepre estas rekta rilato inter tiuj du agoj, ĉu unu estas simple malgranda versio de la alia ? Foje jes : ni ridas, kiam iu faris bonan ŝercon, kaj ni nur ridetas, kiam io estas ja amuza, sed ne sufiĉe por vere ridi, aŭ kiam ni sukcesas regi la ridon. Rido aperas okaze de io amuza, ŝerca, komika. Do teorie rideto devus aperi en similaj kazoj, sed malpli fortaj. Tamen kiam homo "ridetas", tio ne nepre rilatas al io amuza aŭ komika, sed povas temi pri mieno kies instigo estas tute alia. Tial iuj preferas uzi alian vorton por priskribi tiun esprimon de bonesto, kaj Tomas Frejarö (Tomio), sveda muzikisto, ano de la grupo La perdita generacio proponis antaŭ kelkaj jaroj la vortojn *tabasami*, *tabasamo*. Ĝi venas el la svahila lingvo kaj priskribas mienon esprimanta simpatian, bonan, feliĉan, amon...

Knufli: Ankaŭ *knufli* esprimas agon, por kiu oni jam kutimas pri ekzistanta verbo : brakumi. Tamen por tiu ago ofte pli gravas la ideo de proksimeco, de agrabla intimeco, ol la uzo de brakoj, difinita en *brakumi*. Tial kreiĝis la vorto *knufli*, kiu ŝajne devenas el la nederlanda lingvo.

Umi: La sufikso *-um*, elpensita de Zamenhof estas speciala sufikso, ĉar ĝi havas tre malprecizan signifon, kiu varias laŭbezone. Tamen ĝi origine estis nur sufikso, ne memstara vorto. Tiu sufikso estas uzata por esprimi diversajn aferojn, kiel ekzemple:

- Agi en certa maniero, uzante certan objekton : foliumi, brakumi, cerbumi...
- Provizi ion aŭ eventuale sin mem per io : akvumi, aerumi, sukerumi...
- Ĝui ion: kafumi, koncertumi...

Tiu-rilate, oni ekuzis tiun vortelementon memstare, en verba formo. Ĝi ebligas esprimi sin pri sia stato aŭ agado, kiam oni ne volas aŭ ne povas esti preciza. Imagu tiun dialogon :

« Mi laboris en Antverpeno, kaj nun mi vivas dum kelkaj semajnoj en Parizo »

« Kaj kion vi faras en Parizo ? »

« Mi umas »

Tiam « mi umas » averaĝe signifas: "*Mi nenion speciale faras, mi promenas, mi iom vizitas, mi ĝuas la lokon relative pasive.*"

Aliu: La adjektivo *alia* oficiale ekzistas. *Ali-* oficiale ne apartenas al la tabelvortoj de la korelativoj. Tamen kelkaj uzas ĝin kvazaŭ ĝi ja apartenus al ĝi, kreante la vortojn « alio » (io alia), « aliu » (iu alia), « aliam » (en alia tempo) ... Komencantoj ofte faras tion senkonscii, ke estas eraro. Ankaŭ kelkaj fluparolantoj faras tion, sed tutkonscie, elektante tiel evoluigi la lingvon. Ni tamen rimarku, ke uzado de *ali-* kiel korelativa elemento kunportus drastajn ŝanĝojn en la lingvo : « alie » tiam ne plu signifus "alimaniere", sed "aliloke", kaj por esprimi "alimaniere", ni devus diri « aliel »

Postkongresa sindromo:

Tio estas slango (esprimo propra al la esperanto-mondo), esprimanta senton, kiun oni kutime spertas reveninte el esperanto-renkontiĝoj.

Gufujo: Same kiel *krokodilo*, temas nun pri slango jam de longe enradikitaj. Ili naskiĝis antaŭ kelkaj jardekon dum eo-aranĝoj.

Kiel mi diris en la komenco, ĉiuj estas liberaj uzi aŭ ne tiujn neologismojn, aprobi ilin aŭ ne. Tamen ŝajnas al mi grave almenaŭ konsideri ilin, kaj ne tro juĝi tiujn, kiuj uzas ilin. Laŭ mi evoluo de lingvo estas pruvo, ke tiu lingvo vivas. Ĉu ne ĉiam bonas vidi vivo-signon de esperanto? Cetere ĉiuj vivantaj lingvoj evoluas, tamen kutime daŭris plurajn jarcentojn ĝis oni ne plu komprenis la malnovajn librojn aŭ la disiĝintajn dialektojn.

Ĉu ankaŭ kun esperanto tiel okazos? Ĉu indas timi? Persone mi ne timas, ĉar mi rimarkis, ke la videblaj evolu-aspektoj de esperanto jam estas internaciaj, do tio tute ne kompareblas kun ekzemple regionaj dialektiĝoj: Ili aperas, kiam bezono sentiĝas, kaj aŭ tuj malaperas, aŭ disvastiĝas dum internaciaj renkontiĝoj kaj per Interreto.

Per tiu artikolo mi celis liveri bildon de kelkaj novaĵoj en la esperanta mondo, foje oficialaj, foje ne aŭ ne ankoraŭ. Mi aŭdacis transpasi objektivacan regulon por ofte doni mian opinion aŭ eĉ koncilojn. Tamen mia plej granda konsilo estos la jena: Vojaĝu, uzu esperanton kaj mem akiru opinion, ĉu indas uzi tiun vorton aŭ alian, kaj kial.

* * * * *



Nicole Margot:
*Pri Internacia
 Komitato por Etnaj
 Liberecoj (IKEL)*

Ĉiuj fondintoj de IKEL unue membris en la **Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (AIDMLK)** kaj agis en ĝi por la agnosko de Esperanto. Ili sukcesis en 1972 akceptigi ke ties ĉefa nomo estu en Esperanto. Sed neniam ili sukcesis akceptigi Esperanton kiel laborlingvon. En 1978, maliluziigitaj, ili fondis **Internacian Komitaton por Etnaj Liberecoj (IKEL)**. Tiam, *Uwe Moritz* skribis en la numero 20 de la revuo *Etnismo*: «... La tiutempe ege malmultaj internacilingvaj membroj de (AIDMLK) aŭdacis esperi ke nomo estas programo. Evidentiĝis intertempe ke la plej multaj aktivuloj de AIDMLK, simile kiel tiuj de la esperantismaj organizoj, ne komprenas la interdependecon de la diversaj aspektoj de la lingva problemoj.»

Resume:

- iuflanke AIDML ne konsciis pri la **graveco de lingvo politike neŭtrala** por kontraŭstari la hegemonion de iuj ŝtataj lingvoj
- kaj tiam la esperantistoj ne komprenis, ke **justa rigardo al la lingva problemoj nur povas esti en la respekto de ĉiuj popoloj aŭ etnoj, ne nur de la naciŝtatoj.**

Kelkaj vortoj pri la nocio “etnismo” laŭ IKEL-vidpunkto

Mi ne reparolos pri la tuta historio de tiu nocio ĉar tion mi jam faris lastjare sed rememorigos pri la difino de IKEL, kiel oni ĝin trovas en la unua numero de *Etnismo* en la buŝo de *Uwe Moritz*: «**Difinante “etnon” kiel la tuton de tiuj homoj, kiuj parolas denaske, senŝtata aŭ simila premo kaj principo sur ĉiuj kampoj de la homa vivo, la saman lingvon, ni esprimas per “etnismo” la ideon ke la etna grupo estas unu el la gravaj faktoroj determinantaj la homan vivon. Tamen: kvankam aparteno al unu sama etno havas certajn sekvojn por la evoluo de la koncernataj homoj, tiu etna komuneco tute ne signifas ke temas pri eterna fiksitaj stato por tiuj sametnanoj. Etnoj ŝanĝiĝas, disfalas, fandiĝas, “naskiĝas”, “mortas” tra la jarcentoj. Jen unu etno organiziĝas en unu ŝtato, jen en pluraj, jen diversaj etnoj kune formas unu ŝtaton».**

“Difino de Etna Identeco”, Marcel Cortiade.

En 1989 IKEL eldonis etan broŝuron verkitan de *Marcel Courthiade/Cortiade* (1), pri **“Difino de Etna identeco”**.

Li rememorigas, ke **latine** oni distingas la homgrupojn laŭ tri niveloj: ***gens, natio, civitas***. Pri la uzado en Esperanto li diras, ke ekzistus taŭga vorto **-gento-**. Tamen jam en la Fundamento ĝi havis neklaran difinon ĉar en la **kvin traduklingvoj ĝi havas alian signifon** kaj plie ĝi gajnis specifan signifon por la biblia uzo.

Pri la vorto **-nacio-** li diras, ke la unua ekspliko de PIV respondas sufiĉe bone al **-etno-** **«Popolo akirinta konscion pri si-mem kiel aparta socia komunumo pro komunaj karakterizajhoj rezultantaj de historiaj procezoj.»**

Sed en la pliaj difinoj ĝi montras evoluon same konfuzigan, kiel en la etno- aŭ ŝtatlingvoj, **miksante ĝin kun la nocioj de ŝtato, regno ktp.**

Tial **-etno-**, kiu ekzakte koincidas kun la unua difino de **-nacio-** en PIV plej precizas por paroli pri **«homgrupo konscia pri siaj diferencoj kun aliaj homgrupoj laŭ kriterioj, kiuj povas esti teritorio, lingvo, religio kaj aliaj kulturaj tradicioj.»** Al tiuj ĉi kriterioj por difini etnojn, citataj de PIV, *Marcel Cortiade* aldonis: **komunan ekonomian sistemon, komunan devenon, deziron de komuna vivo.**

“Deklaracio por Etnista Humanismo verkita de Daniele Vitali” (2)

Alia grava referenca teksto por IKEL-membroj estas la **Deklaracio por Etnista Humanismo verkita de Daniele Vitali**, itala lingvisto, kiu estis prezidanto de IKEL post *Uwe Joachim Moritz* kaj antaŭ *Alain Favre*, la nuntempa prezidanto. Ĝi estis akceptita en 1999 dum la Universala Kongreso en Berlino. Mi citas tiujn du punktojn:

6. **«ĝeneraliĝo de la principoj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948).»**

7. **«Tamen tiu principo de individua egaleco ne sufiĉas, ĉar la individuo estas parto de pli vasta loka komunumo, komunumo havanta ligon kun la tero, kie ĝi loĝas aŭ kie ĝi kutimas moviĝi. Post la Deklaracio de 1948 ekzistas en la mondo distribuo de la popoloj, kiun nur paca evoluo, sed neniu milito, “etna purigo” aŭ alia perforto rajtas ŝanĝi.»**

Konkludo

Se la apero de la unua numero de **Etnismo** kiel informilo klare ne neŭtrala povis en 1972 ŝoki iujn esperantistojn, la nuna evoluo de UEA, kiu ja restas neŭtrala, ne aliĝanta al iu politika partio, sed engaĝiĝas en la nunaj tutmondaj debatoj kiel la Daŭripovaj Celoj de UNO estas en perfekta akordo kun la celoj de IKEL.

Notoj :

(1) *Marcel Cortiade* estas okcitana lingvisto, kiu fakiĝis pri romaoj kaj multe verkis pri ili. Li suskribis tiun broŝuron okcitanigante sian familian nomon de *Courthiade* al *Cortiade*.

«Pri Difino de Etna Identeco», Marcel Cortiade. Eld. IKEL 1989.

(2) <http://www.etnismo.org/eo/ethum.html>

* * * * *




Mónika Molnár:
Esperanto en la lernejo La Grande Ourse

Mónika Molnár prelegis pri la rolo de Esperanto en la lernejo La Grande Ourse, kie ŝi instruas.

Ili laboras laŭ la pedagogio de Célestin Freinet, franca pedagogo. Temas pri "aktiva instruado", kiu celas ankaŭ aŭtonomecon kaj respondecon de la gelernantoj.

Mónika instruas interalie ankaŭ Esperanton, kiel tute normalan, regulan studobjekton. Per ĝi ili ankaŭ korespondas kun japanaj, urugvajaj, polaj kaj aliaj gelernantoj. Tio larĝigas iliajn horizontojn.

- Artikolo detala pri tiu temo aperos en la sekva numero de *Kulturaj Kajeroj de la Asocio Amikoj de CDELI*.



© KULTURAJ KAJEROJ
de la Asocio Amikoj de CDELI
Aŭgusto 2017



www.cdeli.org/kulturaj-kajeroj